

Leterujo, 3a parto
Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI 582 1974.12.04 & 07

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

La du pasintajn semajnojn ni komencis babiladi kun niaj skribemaj geaŭdantoj. Alvenis poŝtaĵoj el 19 landoj : Aŭstralio, Brazilo, Britio, Ĉeĥoslovakio, Danlando, Finnlando, Francio, Germanioj okcidenta kaj orienta, Hispanio, Hungario, Islando, Italio, Jugoslavio, Kolombio, Norvegio, Pollando, Svedio kaj Svislando. Hodiaŭ ni daŭrigas tiun babiladon.

A.- Koncerne nian prelegserion pri la nunaj ekonomiaj problemoj gesinjoroj *Najbaro en Keighley*, Britio, skribis : « *Kun granda intereso ni povis aŭskulti vian tre trafan priskribon de la stato en la landoj, kiuj antaŭ ne longe forskuis la koloniisman jugon. [...] Kiel vera estas via priskribo de la sinteno, kiun la antaŭaj koloniantoj havas al la antaŭaj dependuloj, ni tre bone povas observi ankaŭ en nia lando. »*

Cl.- Kreiĝis en **La Chaux-de-Fonds**, kiel studfako de Kultura Centro Esperantista, Internacia FERIA Altlernejo. Unu el la temoj de la kursoj de **IFA** estos la **interpopola konduto**. Sub la gvidado de juristoj, financistoj, psikologoj, teknikistoj, ktp, ni provos vidi pli klare kaj pli objektive la kaŭzojn de la interpopolaj konfliktoj kaj la solvojn, kiuj sin proponas.

A.- La esperantistoj ofte havas la impreson, ke ilia planlingvo estas mirakla rimedo al la interpopolaj konfliktoj. Ni timas, ke tio estas grava iluzio, preskaŭ mito, kiu eĉ malhelpas la esperantistojn klare rigardi la realecon. Ni diras tion, nur kiel enkondukon al alia citaĵo el letero de gesinjoroj *Najbaro*. Ĝi entenas en rilato kun la temo Eŭropo, kiun ni havis la okazon pritrakti en rilato kun informado pri la revuo **Eŭropa Dokumentaro**. Rilate al la formiĝo de Eŭropo gesinjoroj *Najbaro* skribas : « *Ĉu ne estas iom ironia la sorto de Eŭropo, se oni pensas, ke kioman fojon diversaj imperiestroj volis unuigi ĝin perforte, tamen ne sukcesis. Almenaŭ ni, esperantistoj, bone vidas la solvon, nome ke Eŭropo unuigĝos sen perforto, havante komunan lingvon, tamen konservante ĉiujn naciojn. »*

Cl.- Tiu aserto de sinjoro *Najbaro*, ke ni esperantistoj, bone vidas la solvon, ŝajnas fonto el mito. La mito de la paciga rolo de esperanto. Eble mi malkontentigos multajn geaŭdantojn. Mi devas diri, ke mi ankaŭ kredis je tiu mito dum la komenco de mia esperantisteco. Tamen baldaŭ mi ĉesis kredi je ĝi. Observu la nuran esperantistaron. Malmultaj homoj. malfortaj organizaĵoj. Malgraŭ komuna lingvo la esperantistaro dum la 80 jaroj de sia ekzisto ne ankoraŭ kapablis doni al si unuecan juran fundamenton. Ili fondis plej diversajn organizaĵojn, kaj ili, ankoraŭ nun, multe kverelas, anstataŭ labori al la starigo de vere reprezenta komuna unuigo de tiuj pli malpli konkurencaj organizaĵoj. Kaj samtempe la esperantistoj imagas, ke kiam Esperanto estos sufiĉe disvolviĝinta, tiam la kontinentoj aŭ eĉ la mondo unueciĝos pere de Esperanto.

A.- Ne, la kaŭzoj de la dividoj inter la homoj kaj la popoloj estas multe pli kompleksaj, ol ĝenerale imagas la esperantistoj. Sen aŭ kun Esperanto la unuecigo de Eŭropo ne estos facila afero. Kaj ne estas eble antaŭvidi, kiel ĝi fariĝos. Eĉ ne estas certe, ke ĝi realiĝos. Oni povas imagi eŭropan federiĝon multlingvan, kiel ekzistas svisa federacio multlingva. Oni povas imagi unuecan Eŭropon, kiu estas la rezulto de ekonomika ekspansio de la plej dinamika lando, ekzemple Germanio. Tiam la sola oficiala lingvo estos tiu de la gvida lando. Oni povas imagi, ke sociaj konfliktoj donos la plimulton al komunismo, kaj ke sub tiu ideologio Eŭropo

subite trovos sian unuecon. Oni eĉ povas imagi unuiĝon de Eŭropo sub formo de koloniado fare de ekstereŭropa potenco, ĉu Usono, ĉu riĉa araba lando, ĉu Sovetio.

Cl.- Estas dubinde, ke esperantlingva Eŭropo longe konservos sian internacian strukturon. En tia Eŭropo la migrantaj laboristoj, la industrio, la supera instruado pli kaj pli disvolviĝus nur en esperanto. Tio signifas, ke jaron post jaro la nombro de la personoj, kiuj ne plu bezonas praktiki la regionan lingvon kreskus. Kun la malkresko de la proporcio de la origina loĝantaro rapide malkreskus la loka naciismo, sur kiu estus konstruita la politika strukturo de la unuiĝo. Oni ne povas imagi veran disvastiĝon de esperanto sen paralela malapero aŭ forta malkesko de la uzo de la etnaj regionaj lingvoj. Pri tio bone konsciis homoj kiel Zamenhof, Hodler, Privat kaj Lanti, kiuj multe meditis je la konsekvencoj de ebla disvastiĝo de la uzo de Esperanto.

A.- Ankaŭ se alia lingvo ol esperanto fariĝus la oficiala lingvo de Eŭropo, tiu lingvo rapide duarangigus la ceterajn lingvojn. La oficiala fariĝus tiu, kiun oni nepre devus scii, se oni volus fariĝi funkciulo de la unuiĝo, se oni volus komerci en tuta Eŭropo, se oni devus doni instruadon en regiono, kie oni ne parolas saman lingvon aŭ al gelernantoj el diversaj lingvo-devenoj. Usono havas lingvo-unuecon malgaŭ la diverseco de siaj enmigrintoj. En la mondorganizaĵoj la kono de la angla fariĝas nepre necesa, dum ne nepre necesa la kono de la aliaj laborlingvoj. Ĉiuj tiuj kompleksaj elementoj ludas sian rolon. La esperantistoj ne sufiĉe studas tiujn fenomenojn, pro tio ili facile simpligas la realecon.

Cl.- Jen multaj temoj, kiujn ni tre esperas, multaj el vi havos la okazon detale pristudi okaze de kursoj de Internacia FERIA Altlernejo, kiu oficiale naskiĝos en majo aŭ junio 1975 kaj kies unuaj kursoj disvolviĝos jam la venontan someron, tio en la urbo La Chaux-de-Fonds.

A.- La venontan semajnon ni daŭrigos nian babiladon kun niaj radio-aŭskultantoj.

Cl.- Vi aŭdis prelegon el Svislando. Parolis gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo!